

Christian Morgenstern,

La tri paseroj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sidadas sur branĉo sen foli'
kun ventro al ventro paseroj tri.

Jen inter la liva kaj dekstra ul'
enmeze sidadas la senhontul'.

Okulojn fermis jam ĉiu paser',
kaj falas sur ilin neĝer' kaj neĝer'.

Kunpremas jen sin la paseroj tre,
malvarmon sentas la meza ne.

Kaj ili, aŭdante la batojn de l' kor',
ankoraŭ jen sidas, se ne flugis for.

*Traduko de la Germana poemo "Die drei Spatzen" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-02.*

Arg-73-143 (2004-01-30 09:00:21)